# Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Oktobro : 2 2022


## MARO KUN PROPRA JURA PERSONECO EN HISPANIO

La Maro *Menor* estas sal-akva laguno apud la Mediteranea Maro, en la regiono Murcio (Hispanio). En la jaro 2019, kaj poste en 2021, aperis tunoj da mortintaj fiŝoj en la marbordo. La kaŭzo de tiu ekologia katastrofo estis la manko de oksigeno en la akvoj de la maro. Tiel, esploroj de la Oceanografia Hispana Instituto montris, ke pli ol 300.000 tunoj da nitratoj uzitaj en apudaj kamparoj damaĝis la tutan ekosistemon.

Sciencistoj plendis pro tio jam de antaŭ multaj jaroj, tamen la aŭtoritatuloj faris nenion por solvi tiun problemon, kiu provokis, tagon post tago, la difekton de tiu bela natura loko.

Pro tiu manko de agado, grupo de juristoj kaj sciencistoj unuiĝis en la jaro 2020 por serĉi juran solvon celante protekti la ekosistemon de tiu maro. La solvo estis prezenti popolan leĝo-faran iniciativon ĉe la hispana parlamento. Temas pri jura figuro kiu ebligas prezenti diskutendan proponon en la parlamento, sendepende de politikaj partioj. Por tio nur estas necese atingi la apogon de almenaŭ



500.000 homoj. Tion oni atingis, tiel en la monato oktobro 2021, propono estis prezentita en la hispana parlamento cele la deklaron de la Maro *Menor* kiel jura subjekto kun propraj rajtoj, simile al juraj personoj, ekzemple asocioj aŭ ne-registaraj organizoj. La defendanto de la propono en la parlamento estis profesoro pri Jura Filozofio, kiu agadis kiel voĉo de tiu maro. Post la aprobo en la Parlamento, la propono iris en la Senaton. La pasintan 21-an de septembro oni aprobis definitive havigi al Maro *Menor* propran juran personecon.

Havigi tiun rajton al natura ento ebligos protekti ĝin kontraŭ ekonomiaj interesoj kiuj povus damaĝi ĝin. Do, la maro estos kiel ne-profitodona asocio kun rajtoj kiujn ĉiuj povos defendi ĉe kortumoj.

# Vorto de la Semajno

**Aŭtonoma:** Politike aŭ ekonomie sendependa, memstara rilate al la tutaĵo, al kiu ĝi apartenas.

**Aŭtonomeco:** Rajto fari siajn proprajn leĝojn kaj decidojn.

**Aŭtonomio:** Stato de sistemo, kiu evoluas memstare, sen influo de aliaj sistemoj. *(Konsilinde uzi "aŭtonomecon")*

**Aŭtonomismo:** Movado celanta al aŭtonomeca statuso de iu teritorio.

**Aŭtonomisto:** Partiano de la aŭtonomeco de sia lando, provinco aŭ komunumo.

Sinonimo: *Memregado.*

*Hispanio ne estas federacia lando, kvankam la ŝtato konsistas el 17 aŭtonomaj regionoj kaj urboj.*




Aŭtonomaj regionoj kaj urboj de Hispanio




Ni jam eldonis paperajn versiojn de la numeroj de la revuo JURA TRIBUNO INTERNACIA eldonitaj dum la jaro 2021 (numeroj 19 kaj 20). Ĉiuj membroj de la asocio ricevis komputilan version de la revuoj. Tamen, se iu el vi deziras disponi pri papera versio, ne hezitu peti tion al ni. Cele al la sendado ni nur bezonas koni vian poŝtan adreson.

Kontaktu kun: [jurista@esperanto.ac](mailto:jurista@esperanto.ac)